



Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalho, 31 - AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

CGC Nº
00406 504/1000-06

MAIO DE 1979

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 45

REDAÇÃO: Maria Almada

II-A LATINAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

S-ano Enrique Kohei sciigis nin, ke dum la Nacia Kongreso de Esperanto en Argentino estis decidite okazigi la II-an Latinamerikan Kongreson en la urbo San-Luís, en la jaro 1980-a.

Samtempe oni decidis, ke ĝi estu ankaŭ Tutamerika Kongreso, por ke pli da reprezentantoj partoprenu ĝin. Ĝi okazos la 12-an de julio.

Li respondecas pri la eksterlandaj rilatoj en la Loka Kongresa Komitato. Lia adreso estas: Enrique Hohei, junin 1599, 2.000 Rosario, Argentina. La interesatoj volu kontakti lin.

La Informa Bulteno de BKE estas je dispono de s-ano Kohei por helpi, se estos necese.

Jen bona okazo por viziti tiun faman kaj ĉarman landon. La vizitantoj certe ĝuos la gastamon kaj amikecon de la esperantistoj de nia najbara lando.

Estas ĉiuj afable invitataj partopreni kaj riĉigi pere de sia ĉesto la II-an Latinamerikan Kongreson. Argentino atendos vin tre amike en la jaro 1980-a.

- x - x - x - x - x - x - x -

66-A UNIVERSALA KONGRESO EN BRAZILIO

Kiel ni jam informis pere de nia

Bulteno 44, estis aprobita de nia Gubernio kaj ankaŭ de la Universala Esperanto Asocio la okazigo de la 66-a Universala Kongreso en Brazilo, en la jaro 1981-a.

Laŭ informo de la Loka Kongresa Komitato, kiu prizorgos la kongreson, la evento estos prezidita de la nacia senatano D-ro José Lins de Albuquerque, elektita en la lasta balotado. Temas pri elstara samideano, kiu certe plenumos sian taskon kun granda distingigejo.

Estis planite, ke la laboroj de la kongreso realiĝu en la nacia Kongresejo de Brazilia.

Nia financa direktoro, s-ano Carlos Augusto Siqueira da Cunha informis nin pri la elektita LKK, kiu konsistas el la jenaj gesamideanoj:

Prezidanto:

Senatano José Lins de Albuquerque
Vicprezidanto: D-ro Enivaldo Alves Lima
Sekretario: Darcy M. P. Gaia
Protokolo: Mauro Gomes de Azevedo
Financa Direktoro:

Carlos A. Siqueira da Cunha
Informoj pri Eksterlando:

Roberto Passos Nogueira
Informoj enlandaj:

Nelson Pereira de Souza
Gastigado: Francisco M. de Oliveira
Ekskursoj: Luiz Mauricio Sá Araujo
Arto: Helmuth Loos
Junularo: Josias Ferreira Barbosa
Infanaro: Maria Vitória Garofalo Loos

Pri la UK respondecas ne nur la LKK-anoj, sed ankaŭ ni ĉiuj, pro tio estas petata ĝenerala kunlaboro kun la membroj de la komitato.

Estas nepre necese propagandi en naciaj gazetoj pri la evento, instrui la lingvon Kaj rekruti gesamideanon nojn al movado.

Ke oni ne forgesu, ke la tempo urĝas, ĉar ni havas nur unu jaron kaj duonon por prestiĝi la kongresgrundon por ke ĝi estu fruktodona. Ek al laboro, karaj gesamideanoj! La movado kalkulas je vi, bezonas vin! Partoprenu ni amase!

- x - x - x - x - x - x - x -

INTERNACIA SCIENCA SIMPOZIO

La Simpozion organizis MEC (Ministério da Educação e Cultura) kaj diversaj fakultatoj en Marilja. Ĝin ne ĉeestis amase la esperantistaro ĉar ĝi estis scienca.

Post ĝia finiĝo restis la demando: kian praktikan utilecon ĝi havis por nia Esperanto-Movado?

Partoprenis la eventon sciencistoj el diversaj landoj, sed ĉiuj prelegis esperante.

Sub la sciencaj titoloj de la prelegoj kaŝiĝis la problemoj de interkompreniĝado en la mondo.

Fine de ĉiuj prelegoj kaj debatoj restis la sento de la neceso de iu taŭga, facile ellernebla lingvo, kiu ebligis kompletan interkompreniĝon.

La kunveno pravas, ke Esperanto ebligas, en iu ajn loko, okazigi konferencojn — sufiĉas paroli korekte Esperanton.

Nek la homa cerbo, nek la komplikaj komputiloj taŭgas komplete. Nur la interlingvo abligas esprimiĝi perfekte. La nescipovo de la lingvo okazigas gravajn problemojn al la homaro, ĉar la migrado de la homoj postulas komunikadon kaj sekve lingvoscion. Ne eblas ellerni ĉiujn lingvojn, sed unu solan, kiu taŭgu al ĉiuj popoloj.

Fine de la dudeka jarcento alvenis la nepra bezono de Esperanto en la mondo.

- x - x - x - x - x - x - x -

EKSPOZICIO PRI INFANDESEGNAĴOJ

Okaze de la I-a Jaro de la Infanoj kaj de la Scienca Simpozio, en Marilja, niaj gesamideanoj Isaura kaj Ivo Sanguinetti,

jam bone konataj esperantistoj, organizis ekspozicion pri infandeseĝnaĵoj.

La malfermon ĉeestis la urbestro D-ro Theobaldo de Oliveira Lyrio Kun sia ĉarma edzino, la pola konsulo, s-ro Mieczysław Klimas kaj aliaj aŭtoritatoj el Marilja.

Inter la sciencistoj troviĝis esperantistoj el Bauru, Promissão, Rio Claro, São Paulo, Rio de Janeiro kaj Santos. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de BKE, prof-ro F. S. Almada kaj edzino.

La vicprezidanto de UEA, D-ro prof-ro Carl Stöp-Bovitz, diris pri la ekspozicio, ke estas mirinda la ebleco okazigi kaj kolekti tiel belan ekspozicion pere de Esperanto.

S-ino Isaura Sanguinetti estas direktorino de la lernejo "Criança Arteira" en Porto Alegre (RS). Ŝi kune kun ŝia edzo en pacienca kunlaborado preparis la ekspozicion.

La eksterlandanoj ĝuis vidinte la belegan laboron de la etuloj el siaj landoj. La geedzoj Sanguinetti nun preparas pli kompletan ekspozicion por la UK en Brazilja. Ni gratulas niajn gesamideanojn pro ilia utila kaj interesa laboro.

- x - x - x - x - x - x - x -

KAMPANJO POR LA BKE-SIDEJO

Daŭrigas kontentige la kampanjo por aĉeto de sidejo por nia BKE en Brazilja. Niaj karaj kaj malavaraj gesamideanoj bone komprenas benzonon de sidejo en nia ĉefurbo.

La tuta brazila esperantistaro unuiĝas por helpi nin. Ni kore dankas la komprenemon kaj helpon.

Se iu ne povas kunlabori finance, volu varbi alian esperantiston aŭ juran organizaĵon por aliĝi al nia kampanjo. Kiu tion faros, ricevos omageton pro tiu laboro. Jen novaj kunlaborantoj, al kiuj ni tutkore dankas: Elvira Fontes, Eugenio Gramignia kaj Delio Pereira de Souza.

D-ro Modesto Belmonte de Abreu kunlaboris kaj diris: "Pri la tuta kotizo de mi sendita por la estonta sidejo de BKE ne bezonas kompenson al mi pere de arĝentplato, sufiĉas nur la konfirmo de la solidariĝo inter ĉiuj esperantistoj, kiuj celas plifortigi nian harmonian movadon".

Dankegon, D-ro Belmonte, pro via leteroj kaj monhelpo. Pro tiom bonaj personoj

noj ni havas forton daŭrigi nian malfacilan taskon en Esperanto-movado.

- x - x - x - x - x - x - x - x -

S-ino Fanny Luiza Dupré, sendis al ni Kunlaboraĵon, kiun ni dediĉas al "Patrino Tago" jen ĝi.

PRECE DA MULHER MADURA

Pai, agora que não estou mais no tempo de alimentar ilusões, aguça meus sentimentos para que eu perceba a beleza das realidades.

Pai, agora que as opções foram feitas e tantas portas se fecharam no definitivo, dá-me aceitação para que as renúncias não sejam um fardo pesado demais.

Pai, agora que a soma dos erros derrubou as jovens ilusões de onipetência, não me tires a pretensão de continuar tentando acertar.

Pai, agora que tantos desenganos, tantas incompreensões, repetiram lições de cetismo, conserva minha boa fé e minha disponibilidade frente às criaturas.

Pai, agora que as forças do meu corpo começam a falhar, alerta meu espírito, livra-me do comodismo, redobra minha vontade.

Pai, agora que já aprendi a precariedade de todas as coisas, as limitações de todas as lutas, as porções de nossa pequenez, afasta-me do desânimo.

Pai, agora que já alcancei o ponto de perspectiva que me dá a exata visão do pouco que sei, livra-me da defesa fácil de colocar viseiras e ajuda-me a envelhecer com a abertura dos corajosos, dos que suportam revisões até a hora da morte.

Pai, agora que aumenta o círculo das criaturas que me olham e esperam alguma coisa de mim, dá-me um pouco da sabedoria, ensina-me a palavra certa, inspira-me o gesto exato, norteia minha atitude.

Pai, agora que perdi a abençoada cegueira

da juventude e só posso amar de olhos abertos, redobra minha compreensão, ajuda-me a superar as mágoas, proteja-me da amargura.

Deus, pai, concede-me a graça de não cair na desilusão, de não chorar o passado, de continuar disponível, de não perder o ânimo, de envelhecer jovem, de chegar à morte com reservas de amor.

Fernanda Fernandes

PATRINA KORO

Cel. Alves Mata

Kiu estas la sankta figuro
Kiun oni vidas muta, ĉe la muro
Larmo en rigardo, kaj doloro en sino?
Estas patrino, amiko, estas patrino . . .

La filo malsaniĝis, ŝi deĵoras,
Ŝi preĝas, ŝi petas kaj ŝi ploras . . .
Kiam malsanas la fileto amata
Patrino Koro estas dolorata.

- x - x - x - x - x - x - x -

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas la jenajn gazetojn: Bulteno de SEK, O.NO.SSO, O Semeador, Folha de Caçapava, O Miliciano, Gazeta da Bahia, Correio Fraterno do ABC, O Líder, O Diário de Marília, Diário do Cacau, Diário da Tarde, Diário de Itauna, Espírita Fluminense, Síntese, ZET — el Jugoslavija, Sul do Estado e O Corujinha.

- x - x - x - x - x - x - x -

VIVU ESPERANTO!

S-ano Lazarus Brieger, delegito de UEA en Rio de Janeiro, sendis al ni gazeteltranĉaĵon, de Diário Popular, el San-Paŭlo. La artikolon verkis F-ino Elvira Fontes, prezidantino de San-Paŭlo-Esperanto-Asocio, kiu pritraktas novan bonfaron de s-ano Brieger.

Temas pri du esperantistoj el Portugalio, liuj de 20 jaroj ne havis reciprokajn sciigojn. Unu el ili vivas en San-Paŭlo kaj

la alia en Raynham Mass Usono. Tiu ĉi skribis petleteron al s-ano Brieger, volante trovi sian amikon kaj li tuj komunikiĝis kun F-ino Elvira, kiu jam dek jarojn verkas artikolojn pri Esperanto-movado por "Diário Popular". Ŝi verkis vokartikolon pri la afero.

La artikolo sukcesis kaj la amikoj finfine trovis unu la alian dank'al laboro, de niaj gesamideanoj.

S-ano Brieger jam longe laboras kaj batalas por la unuigo kaj fortikigo de nia movado en Brazilo. Li ĉiam helpas nian movadon kaj sincere kunlaboras. Gratulon, s-ano Bieger! Vivu Esperanto!

- x - x - x - x - x - x - x -

MONO RICEVITA POR LA BULTENO

Ni ricevis de la jenaj personoj kaj kore dankas:

Claudio Zimmermann		Cr\$ 100,00
Tomazo Morano		1.000,00
Tezo vendita		100,00
Instituto Esperanto de Educação		100,00
J. S.		100,00
Libroj venditaj (Espto. Elementar)		300,00
Prof. João Rodrigues do Prado		100,00
Antonio João F. Padilha		50,00

Sumo 1.850,00

- x - x - x - x - x - x - x -

SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ

S-ano Delio Pereira de Souza pere de sia cirkurelo n° 13 sciigas, ke malgraŭ la plialtiĝo de la kosto de papero kaj kompostado, la enlanda kotizo de Cr\$ 280,00 validas ĝis la 30-6-1979. Por eksterlanda no daŭre ĝi estas US\$ 12,50 aŭ 33 rpk, aŭ egalvaloro.

La komitato aprobis la jenan programon por 1979:

- La du aspiroj de la Homaro, de Nassif Isaac, tuj sendota;
- La voĉo de L'Silento, de H. P. Blavatski;
- Amitado de Kristo, de Thomas A. Kempis;
- Cielo kaj Infero, de Allan Kardec, el-

donota de FEB;

- La Prediko sur la Monto, de Humberto Rohden, eldonota de la Societo;
- La Mortintoj kaj la Mortantoj, de Nassif Isaac, eldonota de l'Societo.

Bilanceto de la unua trimestro: Enspezo: Antaŭa saldo Cr\$ 974,09; - Kotizoj Cr\$ 8.154,00; Libroj Cr\$ 4.305,10; Fonduso Porto Carreiro Neto Cr\$ 220,00; Fonduso Ismael Gomes Braga Cr\$ 17.400,00. Elspezo: Circuleroj Cr\$ 160,00; Libroj aĉetitaj Cr\$ 2.262,00; Libroj eldonitaj Cr\$ 17.400,00; Poŝtmarkoj Cr\$ 2.650,90; Diversaĵoj Cr\$ 205,00; Posta Saldo Cr\$ 8.375,29. Sumo Cr\$ 31.053,19.

- x - x - x - x - x - x - x -

14-A BRAZILA SEMINARIO DE ESPERANTO

Estas preparata la 14-a Brazilia Seminario de Esperanto fare de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, okazonta en Uberaba (MG) de la 19/22 de julio 1979. La kotizoj: depost la 30-a de aprilo - Cr\$ 400,00. Alilandanoj: 35 respondkuponoj. Junuloj ĝis 25 jaroj ĝuas la rabaton de 50%, kaj akompanantoj aŭ edzino kaj filoj pagas la duonon. Adreso de la Kooperativo: Av. 13 de Maio, 47 - sobreloja - 208 - CEP 20.031 aŭ Caixa Postal N° 1887 CEP 20.000 - Rio de Janeiro (RJ).

JUIZ DE FORA ESPERANTO-SOCIETO

La 25-an de Marto 1979-a kunvenis la anaro de la Esperanto-Societo de Juiz de Fora (MG) kaj elektis novan direktaron:

Prezidanto	..	Orlando José Lopes Junior
Vicprezidanto	..	João de Oliveira Gama
Kasisto		Kleber Halfeld
Sekretario		Wilmar Coelho Santos
Prokuroro		Prof-ro José Passini
Bibliotekisto		Reinaldo Zaghetto

La nova direktoraro intencas vigligi la iom stagnitan movadon en tiu urbo, ŝanĝante la statuton, nomon de la organizaĵo kaj planas akiri propran sidejon.

S-ano F. S. Almada, prezidanto de BKE, vizitis la kurson ĉe la Federacia Universitato de Juiz de Fora, akompanata

de pluraj membroj de la restarigita organizacio, dum Prof-ro José Passini estis gvidanta kurson de Esperanto.

Ni deziras fruktodonan kaj sukcesan laboron al niaj gesamideanoj de Juiz de Fora, esperante ke la nova organizaĵo progresigu la movadon en tiu urbo.

- x - x - x - x - x - x - x -

VOLTA REDONDA (RJ)

S-ano Prof-ro D-ro Alberto Flores informis nin, ke en la "Grupo Escolar Professor Luiz Catanhede de Carvalho Almeida", de tiu urbo, funkcias kursoj de Esperanto, gvidataj de la prof-ino Ielen de Medeiros Tavares kaj s-ro prof-ro Denir Lopes. La kurso finiĝos la 30-an de junio 1979, kie lernas 20 gelernantoj.

La gazeto "Sul de Estado" informas pri nova Esperanto-kurso, kiun gvidos D-ro Alberto Flores ĉe la "Faculdade de Filosofia, Ciências e Letras de Volta Redonda", ek de la 19-a de majo kuranta. La kurso daŭros pli malpli 6 monatojn, enhavanta 50 horojn.

Tiu sama gazeto aperigis interesan artikolon verkitan de D-ro Flores, nia senlaca kaj kompetenta samideano.

Nia vicprezidanto Flores ankaŭ informas nin, ke la Portugala Nacia Radio - "Radiodifusão Portuguesa" - disradias esperantan programon ĉiudimanche en kunlaborado kun la Portugala Esperanto-Societo.

Oni povas kapti la mesaĝojn je 31m (9620 KHZ aŭ 25m (11840 KHZ tuj post la hispana elsendaĵo, t. e., je la 22,20 ĝis 22,30 laŭ la brazila horaro.

Ni dankas la utilajn informojn al D-ro Flores kaj deziras sukceson al liaj kursaĵoj kaj efikan laboron al li.

- x - x - x - x - x - x - x -

SAN-PAŬLO (SP)

Ĝus alvenis invito de San-Paŭlo Esperanto-Asocio por la okazonta kunveno de aktivaj esperantistoj en la sidejo de la asocio, la 27-an de majo kuranta.

Estos prelegoj kaj debatoj pri instruado, informado kaj varbado pri Esperanto.

La kunveno komenciĝos je la 9-a

horo, matene, kaj finiĝos laŭvole, havante poste tagmanĝon planitan, en la sidejo mem.

La prezidantino informas, ke estas inaŭgurota tiam la kuirejo de la Asocio, kiu ĝis nun ne funkciis. Prof-ino Elvira Fontes jam ĉion faris, nur mankis al ŝi la kuirado. Nu, nun la partoprenontoj havos okazon prijuĝi ŝian kuirarton. Aperu ni amase!

- x - x - x - x - x - x - x -

PORTO ALEGRE (RS)

Nia atestimata kaj senlaca helpanto, D-ro Modesto Belmonte de Abreu, sendis al ni eltranĉaĵon el la gazeto "Zero Hora", en kiu li faris bonegan propagandon pri la okazonta UK en Brazilo, kaj jam donas informojn al la interesatoj en la Galerio "Di Primo Beck" n^o 1704, en tiu progresema urbo.

La laboro de nia samideano estas grava kaj tre valora. Ni kun granda plezuro konstatas, ke la Ŝtato Rio Grande do Sul ekbrilis kiel meteoro sur la ĉielo de Esperanto-movado dank'al niaj bonegaj gesamideanoj, por kiuj Esperanto estas vere la idealo. Tiamaniere certe ni venkos! Ili estas pacamantoj.

El la sama urbo ni ricevis gazeteltranĉaĵon el "Folha da Tarde", senditan de nia s-ano Arkitekto Ernani Dias Corrêa, kies titolo estas "Como língua universal, o Esperanto fracassou".

S-ano Dias Corrêa demandas nian opinion pri tiu koncepto de la Prof-ro Epitacio Torres, kiu tamen rekonas ĉiujn informojn pri Esperanto kontraŭstarantajn la titolon, sed tio ne gravas, se iu parolas bone aŭ malbone la lingvon; ankaŭ ne influas je la Zamenhofa idealo, kiu estas nuntempe pli necesa ol en la tempo de ĝia kreinto. Se iu parolas pri Esperanto estas ja pruvo, ke ĝi ekzistas. Neniu povas paroli, bone aŭ ne, pri io, kio ne ekzistas. Esperanto estas vivanta, nur la homaro hezitas ankoraŭ ĝin akcepti definitive.

Sed ni venkos! Ni dankas la sciigojn al nia elstara kunlaboranto Corrêa. Imitinda estas la laboro de niaj gesamideanoj el Rio Grande do Sul.

BAURU (SP)

La baŭruanoj ĉiam aktivis. Prof-ino Maria da Encarnação Moreno sendis al ni kunlaboraĵon pere de kiu ŝi informas nin pri la vizito de sciencistoj al FAFIL - "Faculdade de Filosofia" de Bauru, post la finiĝo de la Scienca Simpozio okazinta en Marilja.

En tiu Fakultato ili estis akceptitaj de la monaĥino D-rino Elvira Milani, ĝenerala direktorino de la lernejo. Ilin akompanis la prezidanto de la Esperanto-Societo de Bauru, prof-ro Euclides Giraldis de Carvalho kaj aliaj gesamideanoj. La gazeto "Jornal da Cidade" aperigis ampleksajn sciigojn pri la vizito.

La grupon salutis D-rino Elvira Milani, kies bonvenigon dankis D-ro Carl Stöp-Bovitz, vicprezidanto de UEA, kiu partoprenis la Simpozion.

La vizitintojn bone impresis la moderna kaj bone organizita FAFIL.

Dankegon pro la kunlaboraĵo!

- x - x - x - x - x - x - x -

LA SKOLTA MOVADO

S-ano D-ro Adonis S. Silva, reprezentanto de la Skolta Esperanto-Ligo en Brazilo, informas, ke li ne plu povos aktivi en skolta movado, ĉar pro siaj studoj li loĝos dum du jaroj eksterlande. Li petas, ke tiu, kiu volos lin anstataŭi, sin prezentu al prezidanto de la organizo, s-ano J. K. Hammer - Postbus 433, Zaandam, Holland.

- x - x - x - x - x - x - x -

SALVADOR (BA)

S-ano D-ro José Siquara da Cunha, prezidanto de la Organiza Komitato de la planita 20-a Brazila Kongreso de Esperanto, sciigas nin, ke en la venonta jaro ne plu estos realigota tiu kongreso pro al ni ne klarigitaj kialoj, sed supozeble pro la 11-a Latinamerika Kongreso en Argentino.

S-ano Sergio Luiz Silva Santos informas nin, ke en Salvador, pluraj esperantaj kursoj funkcias, ĉe la fakultatoj en la kadro de Bahia Esperanto-Asocio, kaj nun

plialtiĝas la nombro de instruistoj, ĉar prof-roj Liege Santos Pereira kaj Alberico Santos Teixeira gvidos novajn du kursojn. La nombro de la aktivuloj estas nun 17.

S-ano Silva Santos estas nun nia kunlaboranto, ĉar s-ano Pitanga Rocha, pro siaj studoj, ne plu havas tempon. Ni dankas la ĝisnunan laŭdindan laboron de nia juna Rocha kaj deziras al li sukceson.

Laŭ la informoj, BEA-noj organizas karavanon, celante partopreni la 14-an Saminaron en Uberaba (MG).

Laŭdinda kaj imitinda estas ankaŭ la laboro de niaj respondecaj s-anoj el Bahia.

- x - x - x - x - x - x - x -

ORDEN DEBELL: Criador do Escotismo



BICO DE BENA DE WILSON VILAS

ILHÉUS (BA)

Prof-ro Eleus Leonardo de Sá estas unu el la plej aktivaj membroj de nia movado. Nun li iĝis peranto de la revuo "Transoceana", organo de la Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto. Ĝi celas esti ligilo inter ĉiuj esperantistoj, precipe instruistoj en la regiono de la Pacifika Oceano. Aperas kvar foje jare kaj estas eldonita en Australio, tiu revuo.

Interesuloj turnu sin al la peranto, s-ano Eleus L. de Sá, "Calçada Paraguaú" - 109 - s/101, 45660, Ilhéus (BA).

S-ano de Sá petas la instruistaron kaj esperantistojn, ke bonvolu sendi al li infandeseĝnaĵojn, de infanoj ĝis 14 jaraĵ. Li intencas sendi ilin al Finnlando por ekspozicii ilin tie. Li antaŭdankas ĉies helpon.

Nia vicprezidanto kunlaboras kun diversaj naciaj gazetoj: "Diário da Tarde", "Diário do Cacau", Diário de Itabuna" kaj "Gazeta da Bahia", ĉiuj gravaj informiloj en kiuj li propagandas pri nia movado.

Antaŭ du monatoj s-ano de Sá organizis la 1-an Esperantan Semajnon, pri kiu la Radio Cultura de Ilheus kaj la gazetoj, informis la loĝantaron.

Okazis prelego en la Nukleo de Seicho - No - lo, en Copercacau, en laejo de "Cultura Espírita Jesus de Nazaré" kaj en la "Loja Maçônica Regeneração Sul Bahiana". Estas laŭdinda la laboro de nia kunlaboranto Eleus L. de Sá. Okaze de la Esperanta Semajno estis prezentitaj belegaj esperantaj flagoj, - bonegaj propagandiloj.

- x - x - x - x - x - x - x -

NITERÓI (RJ)

La prezidanto de Niteroi Esperanto-Klubo, D-ro Joaquim do Couto sendis al ni gazeton "Espírito Fluminense", kiu intervjuis lin pri Esperanto. Li donis ĝeneralajn informojn pri nia movado enlanda kaj eksterlanda.

Plezure ni legis en la menciita informilo la nomojn de la gesamideanoj Balbina Ferreira kaj Balthazar Neves, kiuj jam delonge batalas en nia movado.

Prezidanto Couto en al ni skribita letero laŭdis nian informbultenon kaj nian laboron. Ni dankas la afablajn vortojn de nia elstará s-ano.

- x - x - x - x - x - x - x -

CURITIBA (PR)

PROF-RO D-RO GERALDO MATTOS

En la jaro 1948-a, la tiam juna lern-

anto de Franciskana Seminario, Geraldo Mattos, leginte multajn librojn, li trovis inter ili kelkajn, kiuj pritraktis la internacian lingvon Esperanto, en la biblioteko.

Ĉar li ĉiam scivolis pri la scienco, eksatis la Zamenhofan idealon kaj kiel memlernanto li tuj studis kaj ellernis Esperanton. Li perfektigis pri Esperanto kaj tuj verkis plurajn librojn utiligante tiun ĉi lingvon.

Inter liaj verkoj troviĝas "Arĉoj" kaj "Ritmo kaj Vivo" - poeziaĵoj; "Ivan la Sesa" kaj "La Nigra Spartako", prozo. Dank'al lia kompetenteco kaj al liaj verkoj li estis elektita akademiano de Esperanto.

Nuntempe li estas kunordiganto de kursoj postgradigo pri beletristiko ĉe la Katolika Fakultato de Paraná.

En la Internacia Scienca Simpozio okazinta en Marilja li prezentis prelegon titolitan "Kelkaj konsideroj pri la ebleco de algoritmo por la lingva komputado", kiu brile sukcesis.

La libroj de prof-ro Geraldo Mattos estas aĉeteblaj en la KKE - Rio de Janeiro kaj São Paulo Esperanto-Asocio, São Paulo.

S-ano Mattos pro troa okupiteco ne aktivas en nia movado, sed neniam li mankas se ie ajn estas iu tasko solvenda. Li vojaĝas nokte, tage, sed aperas en certa horo. Li estas altvalora persono en nia movado.

- x - x - x - x - x - x - x -

I-A NORDORIENTA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN BRAZIL

Okazis en Natal (RN) la 1-a Nordorienta renkontiĝo de Esperantistoj, de la 12-a ĝis la 15-a de aprilo pasinta.

La Esperanto-Asocio Potiguar organizis grandiozan kunvenon, kiun ĉeestis esperantistoj el ĉiuj najbaraj regionoj.

La renkontiĝo laŭ informoj, kiujn ni ricevis, estis festa kaj riĉa. El Recife partoprenis karavano kun 20 personoj.

La solena malfermo okazis en laejo de SENAC kaj ĝin prezidis s-ano Manoel Alves da Silva, prezidanto de la Asocio.

Sendis reprezentantojn la Guberniestro de la ŝtato (Rio Grande do Norte), la urbestro de Natal, kaj ĉeestis D-ro Geraldo Pires Sitonio, sekretario pri Edukado kaj Kulturo.

Majoro Gilberto Silva Velho, vicprezidanto de BKE, digne reprezentis nian organizaĵon, kion la prezidanto F. S. Almada alte taksas kaj dankas. Ankaŭ Kolonelo Francisco Alves Mata, laste nomumita vicprezidanto de BKE, el Maceió, ĉeestis, reprezentante "Associação Alagoana de Esperanto".

Ludis la nacian himnon kaj la esperantan la ŝtata muzikistaro; krome estis luditaj belegaj kanzonoj omaĝe al kongresanoj.

Ricevis senpagan manĝaĵon la ĉeestantaro en la "Escola Naval" kaj omnibusoj estis disponigitaj al ĉiuj vizitantoj.

La plej solena parto de la evento estis la sankta meso, kiun celebris la jam bone konata kaj de ĉiuj ŝatata Pastro Nogueira Machado, utiligante Esperanton.

Finfine okazis interfraterniga tagamango en la salono de la "Faculdade de Engenharia".

Sicere ni gratulas la Organizan Komitaton pro tiom bona kaj elstara aranĝo de la kunveno. Ili pruvis, ke sufiĉas labori por ke ĉio glate marŝu. Ĉian laŭdon meritas la anaro de la Esperanto-Asocio Potiguar el Natal.

- x - x - x - x - x - x - x -

ESPERANTA GEEDZIĜO

Ĉifoje okazis inter Brazilo kaj Urugvajo. Fraŭlino Esperanto, el Brazilo, Heliana L. C. Correia kaj D-ro Alberto Barrocas, el Montevideo (Urugvajo), kio okazis la 11-an de majo kuranta. Ĝi estis elektita dufoje "Fraŭlino Esperanto" pro ŝia sindona aktiveco.

Ni deziras al la nova geedza paro feliĉon kaj longan vivon, kion ni faras en la nomo de la tuta brazila esperantistaro, ĉar ni scias, ke ĉiuj la samon deziras al niaj karegaj geamikoj Correia-Barrocas.

DEK DEVOJ DE BONA ESPERANTISTO

L.L. Zamenhof

Pagi volonte kaj kun plezuro sian kotizon. Rekomendi la servojn de la lingvo al ĉiu, kiu povas ilin profiti.

Organizi sin kun la esperantistaro sialanda kaj eksterlanda.

Porti en sia poŝo propagandajn libretojn kaj sur sia vestaĵo la verdan stelon.

Aboni kaj legi esperantaj gazetoj kaj revuojn. Gvidi eksterlandan samideanon, kiu bezonas tian helpon.

Aĉeti, ne nur pruntepeti literaturon por legado.

Ne lasi al la sekretario la varbadon de novaj anoj.

Direkti la atenton de siaj konatoj al la praktikaj profitoj havigitaj per Esperanto.

Instrui la ligojn por novaj interesatoj.

- x - x - x - x - x - x - x -

KIO ESTAS VIRINO

La Turko respondas : militkaptitino.

Albano diras: skalavino.

Serbo opinias: servantino.

Bulgaro konjektas: kamaradino.

Laŭ Greko, ŝi estas regantino.

Laŭ la poeto, ŝi estas fonto de la vivo.

x-x-x-x-x-x-x-x-x

Vilaĝanino pelis antaŭ si azenojn. Knaboj renkontis ŝin kaj kriis: "Bonan tagon azenpatrino!" - "Koran dankon, miaj infanoj".

- Respondis la bona virino.

- x - x - x - x - x - x - x -

VICPREZIDANTO ELEKTITA - Lău propono de nia prezidanto, estis elektita nia s-ano Orlando José Lopes Junior, prezidanto de la organizaĵo el Juiz de Fora (MG), por la fako "Bankaj Aferoj", kun kies kunlaborado ni kalkulas.